

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo.

HAMA-RONDA VESPERO

apr. 21 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 306

Pri Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kaj ties lingva ekzamenado laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, estos klarigita de s-ino ISIKAWA TIEKO, estro pri eduka fako de Japania Esperanto-Instituto.

majo 19 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 705

Mireille Grosjean denove! --- Svisa esperantistino vizitis nin antaŭ 2 jaroj, kaj ĉi-jare denove ni vidos ŝin.

RUDIMENTA KURSO

Ni havos kurson, ĉiusabate de la 21a de apr. ĝis la 21a de julio, 13 fojojn (krom la 5a de majo). Kotizo: 6000 enoj.

NOTICO

Jokohama Esperanto-Rondo fariĝis grupa membro de Japania Esperanto-Instituto. La sistemo de "grupa membro" estas de tiu ĉi jaro. Estas ĉ. 40 grupaj membroj de JEI en la fino de marto.



TIEL OKAZIS HAMA-RONDA VESPERO

mar. 17 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 708

Okazis japanlingvaj prelegoj, memore al "Esperanto 125", nome "Jubileaj Esperantistoj". Ĉeestis 20 personoj. Temis pri 2 prelegoj. La unua estis, "Kolomano KALOCSAY, koloso literatura kaj lingva" de SIBAYAMA Zyun'iti, kaj la dua estis "La vivo de Tibor SEKELJ kaj Esperanto" de IWAYA Mituru. Ambaŭ prelegoj uzis komputile prezentitajn bildojn.

En la unua, la preleginto prezentis Kalocsay kaj liajn kunulojn, ĉefe Julio BAGHY kaj Gaston WARINGHIEN. Cetere, li komentis, kiel la poezia stilo, praktikata kaj komentariita de Kalocsay, influis japanajn esperantistojn, ĉu simpatie, ĉu antipatie.

En la dua, la preleginto akcentis multeflankajn agadojn de Sekelj, kaj ke li, famiĝinta pro la grimpado sur Monto Akonkagvo en Argentino, tamen faris nomadan, migran vivon eĉ en la lastaj jaroj de la vivo.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jok-r-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

LEGOKUNVENO

Sten Johansson “Trans maro kaj morto”

En la 3a de marto, ni havis legokunvenon kun 6 membroj, kiuj legis la detektivan rakonton “Trans maro kaj morto” de Sten Johansson. Ĉi tie estas 2 impresoj. Aliaj impresoj japanlingvaj aperas en la japanlingva organo “La Tamtamo”.

Mizro Iwaya

Tiu ĉi libro estas sekva verko de "Falĉita kiel fojno" de la sama aŭtoro, kiun ni traktis en nia antaŭlasta legokunveno, Septembro 2011. Ankaŭ ĉi tie aperas samaj protagonistoj: komisaro Svedberg kaj inspektoro Jankéus de policejo en Kalmar, Svedio. Ĉifoje la krimo okazas en la insulo Oelando, kiu situas oriente de Kalmar. Fakte mi vizitis tiun insulon en la lasta somero antaŭ la 96a UK en Kopenhago. Tial la verko estis des pli intima al mi. Iu alia diris ke Oelando similas al la duoninsulo Miura, kie troviĝas ankaŭ urbo Jokohamo. Do ni povas transnومي la urbon Vickelby al Zusi, Resmo al Hayama, k.t.p. por faciligi nian komprenon.

Interesa krimromano kun la tuta longeco de malpli ol 80 paĝoj --- jen ĝusta kvanto por nia legokunveno. La komenco estis okulfrapa. Infano de irana rifuĝanta familio mortis pro malzorga sinteno flanke de la sveda hospitalo. Samtempe oni trovis kadavron de la najbara pastro. Kian rilaton havas tiuj du okazaĵoj? Iom post iom klariĝas la situacio ĉirkaŭ tiu kazo. Malfacila cirkonstanco de iranaj enmigrintoj en la sveda socio, konflikto inter svedaj kristanaj preĝejoj, rezistemaj junuloj; detala esploro de policaj inspektoroj malplektas kaj klarigas tiun kazon.


Mi volas diri ĉi tie du punktojn. La verko mem estis mallonga, sed mi bezonis relative longan tempon por finlegi ĝin. Unu kaŭzo estas ĝia vortuzo. Aperas multaj nekonataj vortoj, krom urbanomoj, precipe pri plantaĵoj. Alia punkto estas nedecida rezulto. Fine la suspektato arestiĝas kaj subiras proceson. Sed la tribunalo kaj kortumo prezentas nedecideman konkludon. Tio ne trankviligas legantojn. Sed aliflanke ni povas diri ke restas sufiĉe da spaco por nia rezonado. Ni povas ĝui nian rezonadon.

Sibayama Zyun'iti

Temas pri mortigoj en moderna Svedio. Du policianoj (aperintaj jam en alia rakonto de Sten Johansson) enketas, kaptas suspektindulo(j)n, rezonas kio okazis – poste la kortumo diktas juĝon, kies rezonado estas iom alia ol la rezonado de la policianoj. Sed ili rezignacias pri tiu fendo de rezonado, ĉar juĝado ne estas ilia afero. Tiasence, la verko estas tre realisma, ne nur pri enketotekniko inkluzive de DNA-analizo, sed ankaŭ pri la socia fono --- rifuĝantoj el Irano, virina pastro kaj rezisto al tio. Aliflanke, oni ne atendu en ĝi superheroon, kiu magie rezonas.

Iu japana verkisto pri logikaj detektivaj rakontoj diris, ke en bona rakonto, “okazaĵoj dividite per rezonado donu rezulton sen resto”. Nu, tiu ĉi rakonto estas realisma kaj la fendo de la rezonadoj kiel supre menciitaj estas tia resto. Sed mi trovas pli da restoj en la rakonto, nome aferojn nur ambigue kompreneblajn, kaj tio iritas min. Unu el ili estas viro aperinta ĉe veterinaro ne kiel kliento sur “blanka usona aŭtego”, tiu aperinta en ĉevaltrotejo, tiu sama aperinta kun “malnova blanka Chrysler”. Kion li faris? En filmo oni tuj vidus la samecon de la blanka aŭto, sed por koni tion en libro, leganto devas anticipi scii ke Chrysler [krajlsle'] estas usona aŭto. Mi preferas, ke rakonto legota internacie klare indiku tiajn aferojn. Mi ankaŭ ŝatus, ke ie la prononcmannerio de propraj nomoj estu indikita; policano Svedberg estu legata kiel [svedberi], se mi ĝuste konas.

Malgraŭ ĉio ĉi, la rakonto estas interesa kiel real-socia, real-polica, kun spritaj vortuzoj tie kaj ĉi tie aperintaj.



ESEJO

Paŝ-paŝ-paŝ

SIBAYAMA Noriko

Tio okazis antaŭ preskaŭ 20 jaroj.

Ni geedzaj komencis novan vivon en nova domo post kelke da translokiĝoj. Nia nova loĝejo estis domo el kelkdek apartamentoj. Nia domo situis ĉe angulo fronte al monteto.

Tiutempe ni ambaŭ laboris. Kelkfoje en monato, unu el ni devis labori en laborejo kaj la alia povis ripozi hejme. Tiam fojfoje la ripozonto ĝisrevidis la forironton en sia litaĵo duondormante. Ni kutimis dormi en litaĵoj sternitaj rekte sur tatamo. En iu mateno mi dormetis en mia litaĵo post lia ekiro. Pasis kelkaj aŭ kelkdek minutoj. Mi aŭdis sekan piedsonon paŝantan ĉirkaŭ mia litaĵo, "Paŝ, paŝ, paŝ..." Mi cerbumis duonsonge, "Aha, mia edzo ĉirkaŭpaŝas..., sed strange, antaŭ minutoj li certe eliris..., ĉu li revenis por ion porti...?" Mi volis vidi kiu paŝas, tamen miaj palpebroj pezis kvazaŭ kungluiĝintaj. Mi luktis malfermi okulojn dum kelka tempo. Sed vane, ega dormemo venkis. Dumtempe



la sono "paŝ, paŝ, paŝ" daŭre iradis ĉirkaŭ mia litaĵo.

Post tia luktado mi vekiĝis sen problemo, sed tiam neniu estis apud mi. Vespere mi rakontis la matenan okazaĵon al mia edzo. Li kompreneble ne revenis hejmen post la eliro. Mi konkludis, ke mi nur songis. Pasis monato aŭ malpli, tiam mi sola devis labori kaj mia edzo duondormante en sia litaĵo salutis min ekirontan. Post mia rehejmiĝo li diris, "Hodiaŭmatene post via eliro okazis strangaĵo." Laŭ lia rakonto, ankaŭ al li sama afero okazis. Li aŭdis piedsonon sur tatamo, kaj klopodis moviĝi, sed ne povis. Kiam li vekiĝis neniu postsigno restis.

En tiu domo ni loĝis dum dek-kelkaj jaroj, kaj kelkfoje okazis similaĵoj al ni ambaŭ. Ni nomis la fenomenon "paŝ-paŝ-paŝ (japanlingve: *pata-pata-pata*)". Mi mem ne tre timis ĝin kvankam mi estas ege timema. Ĉu iu petolema koboldo loĝis en la domo?



Elfariĝis loka biero en Jokohama

Doi Ĉieko

La 25an de marto (dim.) en Jokohamo okazis la evento "Ekveturo en 2012". Ĝi estis evento por informi novan lokan bieron de "Bay Brewing Yokohama" (Golfo-Bierfarado-Jokohamo), kiun estras s-ro Suzuki Shin'ya 31-jara.

Li laboris dum ses jaroj en restoracio, kie okazas ankaŭ bierfarado. Lastjare en aŭgusto, en bona loko de Jokohamo li malfermis sian trinkejon, kaj en januaro ĉi-jare li finfine havis bierfarejon ĉe la trinkejo. En la bierfarejo li produktas diversajn bierojn. Li faras ĉefe elon, kiu estas malpeza kaj hela biero, fabrikata per malmulte rostita malto (laŭ PIV).

Por ĉi-foja evento li prezentis ĉ. dek specojn da

biero, pri kiuj li fieras. Por tio li mem importis malton el Ĉeĥio kaj produktis bieron, kiun li nomis "Bohemia-Shin'ya-Pilsener", uzante sian nomon Shin'ya. Por la evento li preparis ĉ. du tunojn da biero, kiu povas plenigi ĉ. 6000 glasojn.

Fakte en la tago la eventon vizitis 1160 homoj kaj ĝuis bierumadon. Ili estis liaj amikoj, amikoj de la amikoj, familianoj, najbaroj, konatoj kaj bieramantoj. Ankaŭ la verkanto de ĉi tiu artikolo vizitis, sed estis preskaŭ ne eble gustumi dek specojn. Tiom ampleksa ne estas mia stomako! La loko estis homplena. Ĉiuj gaje trinkis. Certe la evento estis sukcesa. Li celas

fariĝi la plej bona bierfaranto en la mondo!

Parenteze s-ro Suzuki Shin'ya estas filo de s-ro Suzuki Keiichiro, kiu estis prezidanto de Jokohama Esperanto-Rondo, kiam okazis la UK en Jokohamo en 2007.

Unua biero en Japanio estis farita de nederlandano en Nagasako en 1812, kiam Japanio havis fermitan politikon. En 1869, unu jaron post la malfermiĝo de la lando, en Jokohamo G. Rosenfelt (usonano) kaj E. Wiegand (germana inĝeniero) fondis bierkompanion, la unuan en Japanio.

Nun en Japanio estas kvar grandaj bierkompanioj. Krom ili de 1994 post amendo de la leĝo pri farado de alkoholaĵo, estas ankaŭ multaj lokaj bieroj. Nun en Japanio troviĝas ĉ. 200 lokaj bierfarejoj.



Plej maldekstre estas s-ro Suzuki Shin'ya, ĉe la evento "Ekveturo en 2012".

BELETRO



Unu pirarbo --- rakonto de Serbio (1)

Vasilij Eroŝenko

Komuna traduko esperanten de Jokohama Salono

原作：ワシリー・エロシェンコ 「一本の梨の木」 (1921)

Parto 1 (laŭ Aida Yayoi)

Dio multe zorgas pri la sorto, kiun li donis petite de homoj.

--- Mi donis al la knabo iun aĵon. Kiel li fartas de post la donaco?

--- Mi montris al la knabino iun vojon. Ĉu ŝi efektive sekvas la ĝustan vojon?

--- Mi punis la viron per iu maniero. Ĉu li vere marŝas observante ĝin?

--- Mi disciplinis la viron per iu puno. Ĉu li ne rigardas la mondon rankore?

Kaj tiel plu, tiel plu. Dia zorgemo estas tiel senlima.

Iun tagon kiel kutime Dio zorge aranĝis unu post la alia la sennombrajn petojn senditajn el homoj. Kaj tiam li aŭdis voĉojn plendplenajn.

"Mia kara Dio! "

"Mi petegas vin pri via kompato..."

Tiuj estis la voĉoj de tri fratoj loĝantaj en iu vilaĝo. Ili estis eksterordinare malriĉaj fratoj. Ilia havaĵo estis nur unu pirarbo staranta en la angulo de la ĝardeno. Kiam la piroj fruktis, nur tiam ĝuis unu el la fratoj la tempon resti hejme. Alitempe la

tri sanaj fratoj devis labori de mateno ĝis vespero, pri kio ili plendadis ĉiutage.

Dio, kiel mi jam diris, ĉiam intencis doni ĝustan sorton al homoj kaj tial li demandis sin, ĉu ĝi vere estis ĝusta aŭ ne. Se la donita sorto estus erara, tiuj homoj multe suferus nun, kaj krome se ili ekhavis eĉ malbonan kutimon, tio ja estus multe pli mizera. Dio, pro tiu kutima penso, alvokis anĝelon, kiam li aŭdis tiujn plendemajn preĝojn de la tri fratoj kaj ordonis jene.

"Troviĝas nun homoj preĝantaj sur la Tero. Mi petas vin tuj subeniri la Teron kaj kontroli la vivon de la tri fratoj. Se ili rajtus havi pli bonan vivon ol tiun nunan, bone prizorgu ilin."

"Konsentite."

La anĝelo hastis al la Tero por kontroli la vivon de la tri fratoj.

(daŭrigota)

【komentario】

La originalo estas japanlingvaĵo diktita laŭ la parolo de Vasilij Eroŝenko, blinda rusa poeto-fabelisto, en 1921 kiam li loĝis en Japanio. Ĝin unuafoje tradukis esperanten nia grupo Jokohama Salono en 2011 komune.